

Esperanto en Danio

12-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2005



Vizitu standon 402!

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16
✉ dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)
Jytte Sunekær (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Jens S. Larsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40
✉ eed@esperanto.dk

Presado (notu la kolorajn bildojn!):

Kjeld Steffensen, Malmö

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58.
✉ ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero:
01.02.2006**

Enhavo

Persone

Gratulinda pensiigo	4
Donaco memore al pioniro	5
Finiĝis eventoplenaj 100 jaroj 7	
Forpasis Franko Luin.....	8
Pola aventuro	10

Lande

Gazeteltondaĵoj.....	14
Kurso kaj seminario	15
Fonduso Esperanto-Domo	16

Loke

Kopenhago.....	17
Århus	19
Næstved	21

Monde

Radikaluloj aktivas denove...22	
Eŭropaj lingvoj minacataj23	
“Daŭrigebla evoluo”	24
La 91-a UK vokas vin	25
Semajno de homaj rajtoj kaj de Esperanto.....	26

Anoncoj

RevuServo de DEA	27
-------------------------------	-----------

Alproksimiĝas la Librofoiro!

Ĉu vi jam rezervis tempon inter la 18a kaj 20a de novembro? En BogForum, en la unua etaĝo, DEA havos standon 402. Ni tie ekspozicios varian selekton de lernolibroj, vortaroj, literaturo originala kaj tradukita (inkluzive infanlibrojn).

Dimanĉe je la 11-a horo (notu la ŝanĝon de horo!) Robert Philipson tie prelegos pri sia libro “Ĉu nur-anglalingva Eŭropo?” kaj poste subskribos ekzemplerojn de ĝi – notu ke indas esti laŭeble plej multaj ĝuste je tiu okazo!

Unutaga bileto kostas 85 kronojn; dum la vendredo studentoj pagas nur 50 kronojn.

Notu ankaŭ ke

La venonta jarkunveno de DEA
okazos la 25.-28. de majo 2006 en
Kvarnby Popolaltlernejo de Malmö

kie ni kunfestos la 100-jaran jubileon de Sveda Esperanto-Federacio kaj la Malmöa Klubo. Programo kaj aliĝilo sekvos kun la venonta numero de ĉi tiu revuo.

Persone

Lastatempe tiom da unuopaj esperantistoj pensiiĝis, mortis, rememoriĝis aŭ alimaniere elstariĝis. Tial ni ĉi-foje decidis grupigi la artikolojn pri ili.

Gratulinda pensiiĝo

La 20-an de oktobro ĉi-jare 70-jariĝis **Svend Ziegler**, kortuma prezidanto en Kopenhago. Dum 23 jaroj Ziegler havis sian laborlokon en “Østre Landsret”, la orienta ĉefkortumo de Danio. La lastajn dek jarojn li prezidis ĝin, sed okaze de sia naskiĝdata reveno li pensiiĝis. Per tio malaperas el la publika atento unu el la plej gravaj kaj signifaj nomoj de la dana justico. (Ĉi tiu artikolo redonas la informon kiel ĝi aperis en la tutlanda ĵurnalo Jyllandsposten; iom pli longaj tekstoj aperis en Politiken kaj Berlingske Tidende.)

Ricevante la eternan demandon, per kio do li okupos sin post pensiiĝo, la kortuma prezidanto respondas ke li rekomencos la lingvajn okupojn, interalie li legos literaturon kaj biografiojn en la lingvoj kiujn li regas: la

skandinavaj, angla, germana, franca kaj Esperanto. koncerne la lastan, li junaĝe estis tre aktiva interalie en la Studenta Esperanto-Klubo kaj en la estraro de Universala Esperanto-Asocio.

Svend Ziegler kandidatiĝis kiel juristo en 1960, kaj post mallonga restado en la Ministerio de Instruado, li venis en la Ministerion de Justico, kie li avancadis. En 1973 li fariĝis jura konsilisto de la tiama EK-Komisiono kaj depost 1977 li konstituiĝis kiel juĝisto en la urba kortumo de Kopenhago. Samtempe kun la juĝista agado li interalie estis enketa gvidanto en la administracia proceso koncerne la pereon de la savŝipo RF 2, prezidis la komisionon koncerne la translokigon de la Thule-anoj en Gronlando kaj partoprenis diversajn ministeriajn komisionojn kaj konsilantarojn.

Donaco memore al pioniro


Ingrid Friis, filino de la konata forpasinta aktivulo L. Friis, donacis al DEA 50.000 kronojn memore al sia patro. La estraro de DEA estas treege danka por la donaco kiu multe faciligas al ni realigi niajn planojn. La jena biografieto de L. Friis estas bazita sur informoj donitaj de lia nevo Sven Friis Jørgensen.

Kiu estis L. Friis?

Lorenz Friis naskiĝis la 23an de januaro 1904 en Suda Jutlando, kaj do estis 16-jara kiam tiu terpeco revenis al Danio. En 1926 li demisiis el la instruista seminario en Skaarup, kaj kelkajn jarojn poste li edziĝis al Cornelia Lignian el Frislando. Ili ricevis du gefilojn, Ingrid kaj Erik. Dum la pli granda parto de sia vivo L. Friis funkciis kiel instruisto kaj Esperanto-eldonisto en Åbyhøj apud Århus. Li mortis la 11-an de marto 1985.

Skeptikulo fervoriĝis

Unue oni ne kredus ke el la juna instruisto Friis iĝos esperantisto. Li havis junan kolegon kiu ĵus antaŭe lernis Esperanton kaj fervore rakontis al li pri la lingvo, sed Friis nete rifuzis lin. “Vi scias nenion pri Esperanto, tamen vi parolas kontraŭ ĝi”, tiam respondis lia kamerado.



Friis kun f-ino M. Noll, “la patrino de la dana Esperanto-movado” en 1957

Friis konsentis ke li devas studi la lingvon por pruvi ke ĝi estas malbona – sed li mem fervoriĝis vidante kiel genie Esperanto estas konstruita. “El Saŭlo la skeptika fariĝis Paŭlo la fervora” kiel li mem parafrasis la Bibliion.

Se mankas, faru mem

Friis tuj komencis oferti al siaj lernantoj Esperanton post la lerneja tempo, sed post la elĉerpiĝo de la lernolibro de Skeel-Giörling mankis bona dana lernolibro. Do, Friis mem verkis iun. CDEL, la tiama landa dana Esperanto-asocio, ne havis mo-

non por eldoni ĝin, sed f-ino Margrethe Noll helpis lin trovi Kopenhagan eldoniston. Baldaŭ Friis tamen trovis ke estas pli agrable eldoni mem, kaj ĝis 1963 lia lernolibro aperis en naŭ eldonoj. Poste li eldonis serion da kursobroŝuroj internacie uzeblaj, *Esperanto laŭ metodo Friis*.

Kurs-agento

Dana Esperanto-Instituto, kiu nuntempe okupiĝas pri letera Esperanto-kurso, ankaŭ estas establita de Friis. Komence ĝia ĉefcelo estis organizi vesperajn Cseh-kursojn kun eksterlandaj instruistoj, kaj de la komenco en 1933 ĝis la mondmilito la kunlaborantaro kreskis ĝis 11 eksterlandaj instruistoj.

Ankaŭ en 1933 komenciĝis la somerferiaj kursoj, komence en Silkeborg, poste en Helsingør. Ili fariĝis mondfamaj, kaj okazadis pli ol 40 jarojn, eĉ dum la milito. Friis ankaŭ organizis malpli ampleksajn aŭtun-feriajn kursojn en Vejle kaj poste en Århus. Li mem sciis pri minimume 50 paroj kiuj geedziĝis renkontiĝinte dum liaj feriaj kursoj.

Vortaristo

Lerninte lingvon, oni tamen estas sufiĉe senhelpa en ĝi sen bona vortaro. Inter Esperanto kaj la dana tiaj mankis, do Friis faris

iun. Kune kun P. Frey li ellaboris *Dansk-Esperanto Ordbog* en 1934, kaj ĝi ankoraŭ hodiaŭ estas la sola ampleksa dana-Esperanta vortaro. En 1938 aperis *Esperanto-Dansk Ordbog*, kiu restis la plej bona ĝis Eckhard Bick eldonis sian Esperanto-danan vortaron en 1990.

Vojaĝ-agento

En la vintro 1946-7 Friis vojaĝis kun 25 samlandanoj al Finnlando por prelegi en vintra kurso aranĝita de d-ro Vilho Setälä. La sekvan jaron oni ne povis iri, ĉar ne plu estis ŝiplokoj, do Friis anstataŭe organizis busan vojaĝon al Parizo. Tiu vojaĝo estis tiel sukcesa ke Friis aranĝis multajn buskaravanojn al suda Eŭropo dum la 1950-oj.

Literaturisto

La eldonejo de Friis havis danan nomon, *Dansk Esperanto-Forlag*, ĉar liaj unuaj eldonaĵoj estis danlingvaj lerniloj. Sed poste li eldonis ankaŭ internacie popularajn beletraĵojn, ekzemple la humuran krimromanon *Ferio kun la morto* kaj *Rakontu, samideano*, antologion pri travivaĵoj per Esperanto. Fine li eldonis ankaŭ la romanon *Taglaboristoj* de Hans Kirk, kiun li kun W. Jensen tradukis el la dana.

JSL

Finiĝis eventoplenaj 100 jaroj

Unu el la plej gravaj kaj popularaj ĉinaj verkistoj de la 20-a jarcento, la veterana esperantisto Bakin (Ba Jin; origine Li Feigan) forpasis la 17-an de oktobro. La 25-an de novembro li estus 101-jara.

Bakin aktivis en la Esperanto-movado ekde la 1920-aj jaroj, kiam li ankaŭ tradukis el Esperanto al la ĉina verkojn de E. Amicis, A. Tolstoj kaj Akita Ujaki. En 1932 li ĉinigis la romanon “Printempo en la aŭtuno” de Julio Baghy. Ĝi forte tuŝis lin kaj inspiris lin verki ĉinlingve lian propran romanon “Aŭtuno en la printempo”, kies Esperanta traduko aperis en 1980. En Esperanto aperis ankaŭ liaj romanoj “La familio” kaj “Frosta nokto”.

Bakin faris gravajn servojn al la ĉina Esperanto-movado, i.a. kiel prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, kies honora prezidanto li estis. Dum la “kultura revolucio” en la 1960-aj jaroj li estis kruele persekutata kaj publike humiligata kiel “kontraŭ-revoluciulo”, sed post la restarigo de normalaj kondiĉoj li okupis gravajn sociajn funkciojn, inter-

alie kiel vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. En 1981 li fariĝis prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio.

En 1981 Bakin estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estis membro de la Honoraj Komitatoj de ambaŭ Universalaj Kongresoj okazintaj en Pekino, en 1986 kaj 2004. En sia kondolencna mesaĝo okaze de la forpaso de Bakin, la prezidanto de UEA, d-ro Renato Corsetti skribis: “Kelkaj homoj estas pretertempaj kaj preterlokaj. Tiaj estas laŭ mi la grandaj homoj, kies instruoj daŭre restas en la mondo, kiel ekzemple Gandhi aŭ Zamenhof aŭ multaj aliaj, kiuj estas prave rigardeblaj kiel niaj samtempuloj aŭ prefere ĉiu-tempuloj, ĉar ili pluvivas inter ni per siaj pensoj, kiuj daŭre influas nin preter la tempo kaj la loko, en kiu ili vivis. Sinjoro Bakin, aŭ Li Feigan, estas tia por la esperantistoj.”

Gaz. kom. UEA

Forpasis Franko Luin

Subite kaj neatendite forpasis Franko Luin, 64-jara. Liaj proksimaj parencoj estas la edzino Ulla kaj la filo Janko. Franko Luin naskiĝis en 1941 en Trieste, Italio, kie li apartenis al la slovenlingva malplimulto. Estis milito en Eŭropo kaj Triesto estis unu el la lokoj kiuj suferis pro la milito.

Kiel infano li spertis ke oni forkondukis lian patron al koncentrejo kaj ke tiu revenis post la militofino. La gefratoj de la patro helpis al la familio donante manĝaĵojn dum tiu periodo.

En la 50-aj jaroj la familio loĝis en la slovena vilaĝo Repnic sur la altebenejo ekster Triesto. La limoj ŝanĝiĝis post la milito, tiel ke la vilaĝo estis en Italio, je kelkaj kilometroj de la limo al Jugoslavio. La parenkaro de Franko loĝis ambaŭflanke de la limo. La malakordo kun la itala plimulto en Triesto ankoraŭ estis akra.

Franko lernis Esperanton kiel 15-jarulo, kaj partoprenis Esperantajn junularajn aranĝojn en Jugoslavio. Li interesiĝis pri Esperanto kaj pro

vera intereso pri lingvoj kaj pro la interna ideo de Esperanto. Per Esperanto li konatiĝis kun sia estonta edzino Ulla, kaj kun aliaj estontaj amikoj.

Li komencis studi interpretadon en la Triesta universitato, sed decidis forlasi Italion kaj translokiĝis al Svedio en 1961, kiam svedaj kompanioj serĉis laboristojn en Suda Eŭropo. Laborinte en Lund kaj Malmö li eklaboris ĉe Ericsson, kiu tiam havis oficejon en Tyresö, kaj restis tie ĝis 1989.

Ekde 1989 li gvidis la entreprenon Omnibus Typografi kun grafikaj produktoj. Li komencis desegni komputilajn literojn, kaj fariĝis konata pro siaj tiparoj inter grafikistoj en la tuta mondo. Kiel evoluo de la tiparoj li ankaŭ komencis publikigi librojn elektronike. Li aparte interesiĝis pri malnovaj libroj ne plu haveblaj, ekzemple pri svedaj aŭtoroj el la 19-a jarcento, sed ankaŭ pri libroj kiuj ne publikiĝis papere, kaj li havis kontakton kun pluraj nuntempaj slovenaj aŭtoroj.

Franko intersiĝis pri revuoj. Jam junaĝe tiu intereso montriĝis tiel ke li uzis parton de la pormanĝa kaj porbusa mono por aĉeti revuojn, kiam li iris al la lernejo. En la 1990-aj jaroj, kiam la interreto ekuziĝis, li aranĝis kolekton da 15.000 ligoj al revuoj en la tuta mondo, nomitan "Kiosko", kiu fariĝis fundamento de biblioteka sistemo.

La intereso pri Esperanto de Franko estis fadeno tra la vivo. En 1969 li kune kun la edzino Ulla organizis IJK-n en Tyresö. Li tradukis kantotekstojn en Esperanton, kaj mem verkis poezion en la lingvo. Li estis estrarano de SEF, interalie kiel prezidanto kaj redaktoro de La Espero. Kiam li ne redaktis La Esperon, li helpis pri la grafika aspekto de la revuo. Dum periodo li estis komitatano de UEA. Lia grafika kaj komputila scioj faris lin pioniro de interretaj aferoj en Esperantio.

Post la translokiĝo al Svedio en la 1960-aj jaroj Franko ekkomprenis ke li devas ekzerci sian slovenan gepatran lingvon por ne perdi la kontakton kun sia deveno.

Li eklegadis slovenan gazeton, unue abonante, poste interrete, kaj li partoprenis someran kurson por elmigrintaj slovenoj. La familia tradicio en lia hejmmregiono estas forta, kaj la parencoj daŭre havis kontakton kun li. En Svedio Franko havis kontakton kun slovenoj estante estrarano de Sveda-Slovena Amikeca Asocio. La belajn slovenajn kantojn, kiujn li lernis en sia junaĝo, li ekzercadis en slovena kantogrupo.

La filo Janko kiu naskiĝis en 1979 ricevis slovenan nomon, sed lernis Esperanton kaj la Svedan. Por Franko estis grava afero esti bona patro, kaj tial multaj interesoj devis ripozi kiam la filo estis malgranda. Ankaŭ Franko mem estis dekomence dulingva kun slovena gepatra lingvo kaj itala lingvo de la ĉirkaŭaĵo kaj de la aŭtoritatoj. Li lernis la svedan ĝisperfekte. Emocie li ĉiam estis sloveno, kvankam li neniam estis slovena civitano.

Amiko forlasis nin. Li mankas al ni.

Leif Nordenstorm [La Espero]

Pola aventuro

Betty Chatterjee konsentis iom rakonti pri sia esperantistiĝo:

Mi ĉiam deziregis viziti Pollandon. Pollando kaj Danio estas najbaroj, kaj normale estas, ke najbaroj vizitas unu la alian. Plue en tiu lando naskiĝis miaj avo kaj avino, la gepatroj de la patrino. Ili rifugiĝis al Anglio antaŭ 107 jaroj. Ili mortis antaŭ longa tempo kaj mi neniam ilin konis.

Verŝajne pro tio mi revis viziti ilian gepatran landon.

Du fojojn mi jam vizitis tiun landon, sed mi malkontentiĝis, pro la manko de vera kontakto kun la poloj. Mi klarigu.

Turistaj vizitoj

En 2003 kaj 2004 mi traveturis Pollandon per Danaj turistaj aŭtobusoj. Ni vizitis multajn belajn urbojn: Varsovion, Krakovon, Poznanon, Zakopanon ktp. Ĉie ni laŭ-

voĉe admiris la impresajn monumentojn. Ni ankaŭ vizitis du koncentrejojn kaj la vintran kvartiron de Hitler, tie ni silentis pro abomeno.

Ni traveturadis grandegajn arbarojn, kaj ni entuziasmis pri la cikonioj, kiuj ankoraŭ prosperas en Pollando. Danoj estas tre sentimentalaj pri cikonioj, ĉar tiuj birdoj ne plu ekzistas ĉi

tie. Ĉie la gvidisto paroladis pri la historio, la kulturo kaj la geografio de Pollando. En kiu ajn hotelo, kie ni gastis, la akceptistinoj ridete disdonis la sloŝilojn kaj informis al ni pri la numeroj de ĉambroj. Poste en la restoracio ni renkontis la gekelnerojn, kiuj ĝentile servis la manĝojn ignorante la klientajn malĝentilaĵojn.



Danio kaj Pollando estas najbaroj, sed pro la lingva problemo la interkomunikado ne bone funkcias. Mallonge, dum la restado neniam okazis amikaj interparoladoj. La poloj estis kvazaŭ nevideblaj.

Reveninte hejmen post la dua feriado, mi decidis, ke la venontan fojon, mi sola vojaĝos Pollandon kaj mi mem aranĝos la restadon, kies ĉefa celo estos la renkonto kun la indiĝenoj.

Renkontiĝo kun Esperanto

En aŭtuno 2004 mi ekkomencis plani la vojaĝon. Tiam mi ne estis esperantisto. Tamen mi estas 'tro privilegia anglistino', kaj pro tio, per www.hospitalityclub.org, mi skribis konvinkajn leterojn al potencialaj gegastigantoj en Pollando. Mi ricevis du promesojn el gastigemaj familioj en Varsovio kaj Lodzo.

Intertempe mi konatiĝis kun agrabla kaj maljuna esperantisto, kiu esperantiĝis antaŭ kvindek kvin jaroj. Li nomiĝas Georg Kustosz. Georg kaj mi ambaŭ tre interesiĝas pri lingvoj kaj humanismo. Georg naskiĝis en Breslau en Ger-

manio. La patro estis Kristano kaj la patrino estis Judino. Pro tio li devis fuĝi al Danio antaŭ la milito. De tiam li revenis viziti Wrocław (nova nomo), kiu nuntempe situas en Pollando. Li multe vojaĝis per biciklo kaj Pasporta Servo en tiu lando. Li konvinkis min, ke Esperanto estas bona afero pro la kulturo kaj pro la vojaĝmaniero.

En januaro 2005 mi esperantiĝis kaj en marto mi komencis korespondi kun esperantistoj en Lodzo kaj en Bydgoszcz en Pollando. Poste mi aliĝis al Pasporta Servo, kaj per telefono mi kontaktis esperantistinon nomatan Stanja en la urbeto Solec Kujawski, proksime al Bydgoszcz. Stanja ankaŭ estas emerita instruistino. Mi antaŭĝojis renkonti kaj ŝin kaj miajn plumamikojn en Bydgoszcz kaj Lodzo.

Informado

La 18-an de majo mi alvenis Varsovion per aviadilo, kaj tie mi loĝis ĉe ĉarma kaj gastema familio dum kvar tagoj. Ni angle parolis. Wojtek, la edzo, estas bone informita, kaj li multe rakontis pri la ĉefurbo kaj ties historio.

Ili ankaŭ ege deziris, ke mi korektu iliajn anglajn erarojn.. Mi ankaŭ klarigis al ili, ke mi estas esperantisto.

‘Ĉu plu vivas Esperanto?’, ili demandis. Por ili estis granda surprizo!

‘Sed, nuntempe ja la angla estas la internacia lingvo, ĉu ne?’

Skeptiko ŝajnas esti normala reago, kiam oni rakontas pri la internacia lingvo.

La unuajn tri tagojn de la restado en Varsovio la familio estis okupataj pro laboro, do mi piede esploris la urbegon. La tombo de Zamenhof estas en la Juda Tombejo en Varsovio. Senprobleme mi trovis lian tombon, kiu trankvile kuŝis en verda aleo, proksime al la enirejo. Kristanoj metas florojn sur tombojn, anstataŭe estis juda kutimo meti ŝtonojn. Pro tio el Danio mi portis plurajn belajn, strandajn ŝtone-tojn por meti sur lian tombon.

Mia venonta celstacio estis Lodzo. Ĉi tie mi loĝis ĉe gastama familio, kiu ankaŭ parolas angle. Pro ŝia laboro, la edzinon tre interesas angle pliboniĝi, kaj denove mi dankis por la gastamo per lingva korektado. En Pollando

estas 20% senlaboreco, pro tio edukiĝo estas gravega afero. Ilia dektri-jara filino, kiu estas tre diligenta, libertempe lernas svedan kaj anglan konversacion. Ŝi jam decidis, ke iam ŝi fariĝos kuracisto en Svedio. Ankaŭ tiu familio konsterniĝis pri mia Esperanta intereso!

Fine, aplikado

En Lodzo mi renkontis plurajn esperantistinojn. Antaŭ tri monatoj mi jam korespondis kun Mirka, kaj ni faris rendezuon ĉe ŝi. Mirka kaj mi havas komunajn interesojn. Ni estas samaĝulinoj, esperantaj komencantoj, fieraj avinoj kaj ni ambaŭ longtempe eksedziniĝis. Senprobleme mi trovis ŝian apartamenton kaj ĝustatempe alvenis. Sur la tablo estis hejmbakitaj kukoj kaj kafo. Ni eksidis kaj komencis la babiladon. Mirka parolas la rusan, polan kaj esperantan. Mi parolas la anglan, danan, francan kaj esperantan. Pro tio ni ne povis krokodili.

Fakte estis mirige! Por mi estis la unua esperanta konversacio. Ni sukcesis malrapide paroli pri multaj temoj: ŝatokupoj, komputiloj, malsanoj, samideanoj, infanoj,

genepoj kaj (fi)eksedzoj. Sen Esperanto ni neniel emus interparoli. Verŝajne ne estis profunda konversacio, sed ni egale ĉeestis. Bedaŭrinde nin interrompis la telefono. Estis la ekседzo, kiu hazarde estis en la urbo kaj deziris tuj ŝin viziti. Tiel finiĝis nia interparolo! Tamen Mirka aranĝis renkonton kun aliaj esperantistoj en Lodza kafejo la sekvan tagon. Ankoraŭ estis bonega okazo renkonti samideanojn.

La lasta celstacio estis Solec Kujawski, tie mi restis ĉe Stanja. Ŝi renkontis min en stacidomo, kaj ni veturis per buso ĝis la parkejo. Dum la busveturo ni senĉese interparolis. Stanja bone parolas Esperanton, kaj ne timas paroli.

En la buso estis junulino, kiu fiksrigardis nin. Eble, neniam ŝi aŭdis tian strangan lingvon! Ĝentile Stanja informis ŝin pri la internacia lingvo. Poste, multajn fojojn mi spertis, ke ŝi ekkaptis la ŝancon reklami pri la afero. Kompreneble ŝi estas bonega heroldino.

Hejme en la mondo

Dum la restado ĉe Stanja mi preskaŭ forgesis, ke mi

estas 'fremdulino'. Mi sentis kvazaŭ mi tute partoprenas en ŝia ĉiutaga vivo. Mi renkontis la tutan familion escepte de la filino, kiu loĝas en Londono.

La 26-an majo en Pollando estas la tago de patrino kaj ni vizitis la patrinon de Stanja. Ni malferme parolis pri multaj temoj, kaj ni neniam krokodilis, ĉar Esperanto estis nia sola komuna lingvo.

Mi ankaŭ vizitis aliajn esperantistojn. Mia plumamikino Eva kaj ŝia familio kaj Johano kaj lia familio ĉiuj loĝas en Bygdoszcz, kiu estas proksime al Solec Kujawski.

Ili estis bonegaj ĉiĉeronoj kaj tre gastemaj. Johano estas esperanta eldonisto kaj presisto. Li donis al mi plurajn librojn, inklusive 'Kantu kaj lernu Esperanton'. La lastan nokton en Solec Kujawski ni sidis en ĝardeno. La vetero estis bela, kaj ili instruis al mi kanti polajn kantojn en Esperanto.

Reen

La venontan tagon mi veturis per trajno al Varsovio. La lastan nokton en Pollando mi gastis en hotelo proksime al la flughaveno. Estas komforta,

teda kaj vanta. Mi rememoris la antaŭajn Polajn feriojn.

Jen estis la rakonto pri mia unua vojaĝo per ‘Pasporta Servo’. Nun mi revas pri la venonta aventuro. Tiam mi esperas, ke mi pli bone parolos la lingvon, ĉar ju pli parol-facila, des pli utila ĝi estos. Intertempe mi ĝojas akcepti vojaĝantojn. La venontan

jaron mi partoprenos en la ‘Pasporta Servo’. Antaŭ du monatoj, la familio en Lodzo jam vizitis min. Ĉina esperantisto min jam vizitis. La familio en Varsovio promesis iam min viziti. Stanja alvenos en majo 2006. Ĝis la revidoj ni nutros niajn amikecojn per la retroŝto kaj per la telefono.

Gazeteltondaĵoj

Aŭgusto:

Ugeposten Gilleleje, intervjuo kun Birhte Trærup okaze de la traduko kaj eldono de la HCA-libro *Bildolibro sen Bildoj*.

Politiken, Brita Olsson 85-jara.

Septembro:

Politiken montras koverton kun esperanto-poŝtstampo en konkurso ‘Dagens kuvert 4’.

Politiken, intervjuo kun Kim J. Henriksen rilate malferman domon pro la Eŭropa Lingvotago.

Oktobro:

Politiken kaj *Berlingske Tidende*, intervjuoj kun Sven Ziegler 70-jara.

Prelego de Ulla Møller kaj Allan Mogensen menciita 5-loke en *Næstved* kaj *Berlingske Tidende*.

Krucvortenigmo uzanta la vorton Esperanto.

DSB i dag pri kunveno kun prelego de Robert Philipson.

Daŭre sendu viajn kontribuojn al la kolektanto Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved.

Kurso kaj seminario ĉi-vintre

Dum la semajno 5 de 2006, de la **30-a de januaro ĝis la 5-a de februaro** DEA planas starigi en Kopenhago kurson por komencantoj kaj daŭrigantoj, kaj semajnfine seminarion por instruantoj.

Kursgvidanto estos la **prezidanto de ILEI** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), **Radojica Petrović**.

Orientiga programo de la kursoj:

De lundo ĝis ĵaŭdo vespere: rekta/komunika kurso kun elementoj de interkultura aliro.

Vendredon vespere: ekzameno de la kursanoj kaj komenco de la seminario.

La seminario pritraktos temojn pri E-instruado kaj lingvoinstruaj metodoj ĝenerale, planado de E-kurso, planado de leciono, elektitaj temoj, E-kulturo, lingvaj ekzercoj kaj ludoj en lingvoinstruado kaj lernado.

Interesitaj partoprenantoj bonvolu kontakti la prezidantinon Ileana Schrøder.

Ni samtempe planas starigi **danan sekcion de ILEI** por plialtigi la kvaliton de instruado, kaj doni al niaj instruantoj eblecon daŭre ĝisdatigi siajn spertojn.

Fonduso Esperanto-Domo

Ek de la jaro 2003 ĝis la fino de 2007 la Fonduso estas liberigita de imposto. La Fonduso tiamaniere ŝparas la imposton, kaj samtempe, la rentoj dum 5-jara periodo plialtigos la kapitalon. **La Fondusa kapitalo je la 31 de decembro 2004 estis: 757.722.- kronoj.**

Se ni volas atingi la ĉefan celon de la Fonduso (havigi propran sidejon por pli efike disvastigi Esperanton), estas evidente ke ĉiuj esperantistoj, sendepende kie oni havas loĝlokon en Danio, devas pensi serioze kaj kontribui **ĉiujare** por atingi tiun celon. Ni ĉiuj respondecas pri la daŭra aktivado kaj disvastigado de Esperanto, eĉ se ni foje ne plu havos senpagan lokon por kunveni.

La Fonduso estas registrita en la registrejo de la Komunumo de Kopenhago de la 1-a de januaro 2005, tio signifas ke ekde tiu ĉi jaro oni rajtas depreni la donacintan sumon de propra imposto. Tio validas se la sumo superas 500.- kronojn jare. Maksimuma deprensumo estas 6.400.- kronoj jare. Por povi depreni tian sumon oni devas entute pagi 6.900.- kronojn.

Pri la §8A de la imposta leĝo por la aprobo de donacantoj de la 1. de januaro 2005

La ĉefa kondiĉo por ke la Fonduso povu ricevi donacojn estas, ke **la numero de donacintoj superu 100 donacintojn jare, dum 3 jaroj.** La minimuma donacosumo tiacele estas 50.- kr. kaj maksimuma sumo 6900.- kr.

Pagu al la fondusa ĝirilo n-ro 4230-818843, Den Danske Bank, Fonden for Esperanto-Domo (kasisto: Arne Casper, telefono 3920 6348).

Suplementa informeto: Ankaŭ testamentitaj sumoj estas imposto-depreneblaj.

La Estraro de la Fonduso elkore dankas por via kompreno kaj kontribuo.

Ana Røssum

Kopenhago

Bedaŭrinde ne plu ekzistas la ebleco pri interreta aliro en la KEK/DEFA-klubejo, Vasbygade 10, sed per komputilo ni povas prezenti Esperanto-kurson kaj aliajn enmetitajn/enmetotajn erojn. Daŭre la klubo havas la retadreson defakek@hotmail.com, kiun ni malfermas antaŭ ol iri al la kunvenoj

La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas 18.30.

Kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79.

- Kurso por komencantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45
- Kurso por daŭrigantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45
- Legogrupa ĉiulunde 19.00-19.30 kaj 20.00-20.45

7/11: Brita Olsson rakontos pri sia vivo kiel urba ĉefbibliotekisto en Kopenhago. Ŝi estis aktiva en 'Dansk Kvindesamfund' (Dana Asocio por Virinoj), kaj ŝi rakontos pri la laborista esperanto-asocio en Danio. Kursoj.

14/11: Arne Casper, ĉefdelegito de UEA por Danio, rakontos pri la 2006-a UK en Firenze (IT) – prezoj, aliĝoj, informoj ĝis nun haveblaj ... Kursoj kaj studgrupoj.

21/11: Numerludo. Kursoj.

18-20/11: BogForum / Librofoiro: vidu p. 3.

28/11: Kursoj kaj studgrupoj.

5/12: Ileana Schröder informos pri aktualaj Movadaj temoj. Kursoj.

10/12 **KEKG:** Zamenhof-vespero. Detaloj aperos.

12/12: Julemiko.

La komuna programgrupo de KEK kaj DEFA deziras al ĉiuj agrablajn festotagojn kaj feliĉan, prosperan Novan Jaron.



La 14-an de oktobro ni partoprenis la Kulturan Nokton per ekspozicio en "Huset" en centra Kopenhago. Ĝi estis granda sukceso; ekzemple 20 homoj anoncis sin al novaĵ-listo. Nia partopreno estis organizita de Bent Jensenius, estrarano de DEA.



Ĉi tio estas situacio de la unua Esperanta “sitkomo”, t.e. televida komedio, produktita de la aktiva artista duo “La Loko” en Kopenhago. La du personoj sur la bildo ne estas la artistoj, sed aktorinoj kiuj lernis Esperanton aparte por la sitkomo. Ĝi estis prezentita en la art-ekspoziciejo Overgaden la 3-an de novembro – unu tagon post la finredakto de ĉi tiu numero.

Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310 Tranbjerg J.

Tel./fakso: 86 29 23 06. Retpoŝto: stanislaw@ofir.dk.

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: je la 19:30 h.

Okazos:

24.11: Jonas Dalmose aranĝos Esperanto-kurseton. Bedaŭrinde niaj kunvenoj estas maloftaj. Ni ekzercas Esperanton tro malmulte. Venu do, lernu pli, ekzercu pli! Jonas certe igos nin esti atentemaj tiun vesperon.

15.12: Zamenhof- kaj Kristnaskofesto. Bonvolu kunporti iun pakajeton je la valoro de ĉ. 25 kronoj por nia loterio.
Rimarku: nia kunveno komenciĝos je la 19.00 horo!

Bonan Kristnaskon kaj feliĉan Novan Jaron 2006!

Kunvenoj en 2006:

26.01: „Novjaro en mia lando”.

23.02: Ĝenerala kunveno.

30.03: Esperanto-kurseto.

27.04: ne programita

18.05: ne programita

10.06: Somera ekskurso.

Okazis:

29.09: „Mia ferio”. Ĉiu partoprenanto rakontis pri sia ferio 2005. Kelkaj el ni estis forvojaĝintaj, do venis nur sep partoprenantoj. Tamen ne mankis bona humoro kaj la emo rakonti pri someraj travivaĵoj.

27.10: Mathias Dalmose restadis aŭtune 2004 ses monatojn en Brazilo, el ili kvar monatojn en “Bona Espero”. Li rakontis en tre bona Esperanto pri la vivo en tiu Esperanto-komunumo/lernejo kaj montris bildojn pri “Bona Espero”.

Mathias instruis la infanojn tie pri Esperanto kaj la angla lingvo, helpadis en la ĉiutagaj agoj. Kune kun japana junulo li katalogis Esperanto-librojn, kiujn “Bona Espero” donace ricevadis dum multaj jaroj kaj kiujn oni neniam ordigis. Li ankaŭ faris novan vojŝildon, kiun oni ŝtelis, kaj kiu staras nun ĉe la aŭtobushaltejo, de kie oni devas marŝi ankoraŭ 4 kilometrojn por atingi “Bonan Esperon”.

Ni eksciis, ke la ĝisnunaj gvidantoj de “Bona Espero” fariĝis sufiĉe aĝaj kaj baldaŭ ne povos plu gvidi “Bonan Esperon”. Kiu anstataŭu ilin?

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tlf 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.

Kunvenoj okazas principe ĉiun duan vendredon dum la monatoj septembro-aprilo en Grønnegades Kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111, ekde h 19.30.

Okazos:

Ve 11.11: Gramatikaj ekzercoj, traduko de Ugedagene de H.C. Andersen, videofilmo pri Esperanto-temo.

Ve 25.11: Hans Jørgen Kristensen: danlingva prelego pri vojaĝo sur Mekongo ĝis urbo Mandalay. Anoncota al ekstera publiko.

Ve 09.12: Kristnaska aranĝo.

Prognozitaj kunvendatoj ĝis aprilo 2006:

06.01, 20.01 (danlingva prelego), 10.02,
17.02 (ĝenerala kunveno), 24.02 (danlingva prelego),
10.03, 24.03 (danlingva prelego), 07.04 (sezonfino).

Okazis:

27.08: Okazis speco de sezon-starto de la vsperlerneja laboro, kaj ni partoprenis per multaj ekspoziciaĵoj, inkluzive komputilan lernprogramon. Magra rezulto.

23.09: Ni ekzercis kelkajn gramatikajn problemojn, komencis prilabori krudan tradukon de la HCA-fabelo *La semajnotagoj*, kaj spektis dunonon de la videofilmo pri UK en Gotenburgo.

07.10: Sama proceduro kiel 23.09, kun la resto de la filmo.

21.10: Ulla kaj Allan rakontis amuze kaj interese pri pluraj siaj vojaĝoj i.a. al Tajlando kaj surŝipe en la greka insularo. Eksterkluba publiko ĉeestis.

Radikaluloj aktivas denove

La italaj radikalaj EU-parlamentanoj Marco Pannella kaj Emma Bonino prezentis tri parlamentajn demandojn al la EU-Komisiono por ekkoni ties starpunktojn pri:

- justo kaj efiko de la lingvaj politikoj,
- stato de multlingveco en la instru-sistemoj kaj
- vivkapablo de la lingvoj en Eŭropo.

La du radikalaj EU-parlamentanoj petis informojn pri tio kio aperis en la franclingva gazetaro koncerne la tiel nomata “Raporto Grin”, laŭ kiu Britio gajnus, nete, ĝis 18 eŭro-miliardojn jare el la nuna dominado fare de la angla lingvo, dum pli avantaĝa evidentiĝas instruado de Esperanto, kiu estigus ĉirkaŭ 25 eŭro-miliardan netan ŝparon por la tuta Eŭropa Unio (inkluzive Brition kaj Irlandon).

Specife Pannella kaj Bonino demandis, ĉu trudo de la angla kiel la unua fremda lingvo en la lernejoj en Italio ne kontraŭstaras la tiuteman Eŭrop-unian juron, kaj ĉu ĝi ne konsistigas ankaŭ perfortadon de la merkato.

Krome la du radikalaj gvidantoj petis specifajn donitaĵojn pri la nombro kaj la procentaĵo de la Eŭrop-uniaj lingvoj instruataj kaj uzataj en la lernejoj kaj en la universitatoj, en esplorado kaj en faka instruado. Fine, memorigante ke – laŭ asertoj de la “Unesko-atlaso de lingvoj riskantaj malaperi” – ĉirkaŭ 60% de la eŭropaj lingvoj povus baldaŭ malaperi, Pannella kaj Bonino petis la EU-komisionon provizi detalan raporton pri tiu fenomeno kaj sugestis, ke la Eŭropa Unio alprenu politikajn iniciatojn, kiel establaron de “Eŭropa observejo de la lingvaj politikoj” aŭ aranĝon de “Eŭrop-unia konferenco pri la lingvoj.”

DEA sendis al la danaj EU-parlamentanoj leteron informante pri la demandoj de Pannella kaj Bonino, kaj ni ricevis dankleterojn de Jens-Peter Bonde kaj de la tri parlamentanoj de la liberala partio “Venstre”: Karin Riis-Jørgensen, Niels Busk kaj Anne E.Jensen.

Ileana Schrøder

Eŭropaj lingvoj minacataj

La 25-nacia Eŭropa Unio devas agi decide, se ĝi deziras garantii la estontan vivipovon de siaj 21 oficialaj lingvoj, laŭ internacia renkontiĝo de fakuloj en Vilno, Litovio.

Tiun averton oni publikigis la 22-an de aŭgusto 2005 nome de la pli ol sepdek partoprenintoj en la Kvara Nitobe-Simpozio, inter ili universitatoj, politikistoj, registaraj funkciuloj, kaj lingvaj aktivuloj.

“Oni multe maltrankviliĝas pri la estonteco de la pli malgrandaj naciaj lingvoj, inkluzive la plimulton de la lingvoj de la novaj membroŝtatoj de EU”, diris d-ro Humphrey Tonkin, profesoro pri humanecaj studoj en la Universitato de Hartford, Usono, kaj unu el la kunvokintoj de la simpozio.

“Multaj decidoj estas nun farataj cele al fortigo de eŭropa unueco, sed sen konsidero de iliaj lingvaj implicoj”, aldonis d-ro Tonkin.

Inter la partoprenantoj en la simpozio, kiu okazis en la litova parlamentejo de la 30-a

de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, estis parlamentanoj el Latvio, Litovio, Pollando, Slovakio kaj Slovenio. Ili ĉiuj konsentis, ke iliaj naciaj lingvoj riskas diversmaniere flankenŝoviĝi ene de EU.

“Estis pli ol 500 eraroj en la latva traduko de la Konstitucia Traktato”, notis la latva ministro pri edukado kaj kulturo, d-rino Ina Druviete. “Kiel entute havi sencoplenan politikan debaton en tiaj kondiĉoj?”

D-ro François Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, liveris pritakson de la ekonomiaj avantaĝoj al Britio de la vasta uzo de la angla kontraste al pli larĝa lingvomikso en Eŭropa Unio.

“Eĉ laŭ plej sobra kalkulo, tiuj transpagoj al Britio sumiĝas je pli ol 10 miliardoj da eŭroj jare”, diris d-ro Grin. “Pli aktiva multlingva politiko kostus similan sumon sed distribuus la kostojn kaj avantaĝojn multe pli egale.”

La Simpozio aŭdis ankaŭ pledantojn por pli granda rolo

por la internacia planlingvo Esperanto ene de EU.

“Ĝi estas la sola solvo samtempe justa kaj efika”, opiniis d-ro Sean O’Riain, irlanda diplomato, kiu aktuale prezidas Eŭropan Esperanto-Union.

La konkluda dokumento de la Simpozio, redaktita de unu el la organizantoj de la Simpozio, d-ro Mark Fettes, profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser, Kanado, alvokas la membroŝtatojn de EU al kunlaboro pri evoluigo de komuna lingva kadro, kiu ekvilibrigu, unuflanke, protekton kaj pozitivan agnoskon de lingva diverseco, kaj, aliflanke, la bezonon de efika, altkvalita komunikado inter ĉiuj civitanoj de EU.

La Simpozion organizis Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj, en kunlaboro kun la Universitato de Vilno kaj la Litova Akademio de Sciencoj, kun subteno de Esperantic Studies Foundation.

Pliaj informoj troviĝas en la retpaĝaro de la Simpozio:

<http://www.esperantic.org/nitobe2005.htm>.

[Ret-Info]

“Daŭrigebla evoluo”¹

La temo de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco 2006 estas “Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo”. Pri la temo decidis la estraro de UEA, kiu invitis kiel reĝisoron de ĝia traktado en la UK la ĉilian komitatanon de UEA José Antonio Vergara.

La traktadon de la temo partoprenos eminenta lingvopolitika fakulo François Grin, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de Ĝenevo, kiu festparolos en la kongresa inaŭguro. Prof. Grin skribis 127-paĝan raporton pri lingva politiko en Eŭropo, interalie pri la avantaĝoj de Britio pro la vasta uzo de la angla kontraste al pli larĝa lingvomikso en Eŭropa Unio.

La temreĝisoro s-ro Vergara, atingebla retpoŝte ĉe jovergaola@surnet.cl, volonte akceptas proponojn pri aliaj kontribuoj kaj ideojn pri la temtraktado.

¹ Dane: bæredygtig udvikling.

La 91-a UK vokas vin

Venu al Italio en 2006!

Post kvindek unu jaroj de la lasta Universala Kongreso en Italio, en la urbo Bologna, denove okazos Universala Kongreso de Esperanto en Florenco, do en centra Italio, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006.



La italaj esperantistoj jam komencis pretigi sin por la organizo de tiu tre grava evento, kiu sendube altiros multajn samideanojn el multaj landoj. Florenco (itale Firenze) estas tutmonde konata kiel centro de arto kaj de kulturo, kaj ĝi estas ankaŭ lulilo de la itala lingvo. Inter la jarcentoj 14-a kaj 15-a Florenco estis unu el la lokoj de plej granda

idea kreemo en la tuta mondo. Ĉi tie naskiĝis la humanisma movado. Humanismo konsistas el konvinkita valorigo de la homo kaj el la ebleco konstrui mondon taŭgan por la homo.

Pri tiaj temoj kaj pri multaj aliaj oni prelegos dum la UK. Oni organizos vizitojn al la ĉefaj artaĵoj kaj monumentoj de la urbo. Pluraj ekskursoj dum- kaj post-kongresaj estas antaŭvidataj. La LKK ankaŭ laboras por povi proponi oferton de loĝ-eblecoj de diversaj tipoj kaj diversaj kostoj.

Baldaŭ aperos pli detalaj informoj pri la programo kaj pri la kostoj.

Do komencu meti en viajn programojn vojaĝon al Italujo en 2006.

Por informoj skribu al:

LKK de la 91-a UK
ĉe Itala Esperanto-Federacio
Via Villorresi, 38
IT-20143 Milano, Italio.

Retpoŝte:

uk2006.informoj@esperanto.it

Semajno de homaj rajtoj kaj de Esperanto

Milionoj da verdaj kandletoj ekbrulu samtempe la 15-an de decembro por marki la Zamenhof-feston! Tiu estas unu el la plej originalaj ideoj, kiujn mi renkontis kunlige kun la festo de la 15-a de decembro, kiu estas nomata Zamenhof-festo kaj Tago de la Libro en Esperanto. La kandletoj estis efektive produktitaj. La festo estas tre sentata en ĉiuj mondopartoj, kaj la agadoj en tiu dato estas de pluraj specoj, de pure komunumismaj (kunveno de esperantistoj, festo inter ili kaj aĉetado de libroj) al pure finkenvismaj (marŝado tra la stratoj kaj disdonado de informiloj. Tio estas pli facila en la landoj de la sudo, kie la temperaturo efektive estas somera).

Pasintjare ni festis ankaŭ la tagon de Homaj Rajtoj, kiu okazas tute proksime, tio estas la deka de decembro. El tiu proksimeco ni venis al la konkludo, ke nenio pli kongruas kun la strebo de esperantistoj ol Homaj Rajtoj. Finfine nia celo estas certigi la lingvajn homajn rajtojn de la homoj je ĉiuj niveloj. Ni havas ankoraŭ grandan taskon por klarigi al la neesperantistoj, ke Esperanto estas la sola ebla ilo por certigi tiujn rajtojn en justeco, tamen ni plustrebas.

El tiu kombino, kaj pro tio, ke ofte la 15-a estas festata la antaŭan aŭ la postan dimanĉon, naskiĝis la ideo, ke ni havu tutan festan semajnon, kiu inkluzivu la 10-an de decembro kaj la 15-an.

La estraro diskutis, la afero estis prezentita al esperantistoj ekster la estraro, kaj ĝi estis aprobita kaj laŭdita. Nun estas via vico, karaj esperantistoj tra la mondo, festi tiun semajnon laŭ viaj emo kaj eblecoj.

Nun la festo ebligas kaj agadon al la ekstero (pri Esperanto kaj lingvaj homaj rajtoj, pri la idealaj valoroj de nia lingvo) kaj la tradician pli internan agadon (festo de la libro en Esperanto, kluba kunveno por memori Zamenhof). Ĉiu el la du grandaj animoj de la movado trovas sian ŝatatan elementon.

Cetere la ekzisto de alekstera elemento (la homaj rajtoj) igas dezirinda la kunorganizado de eventoj kun neesperantistaj asocioj.

Ĉi-jare la afero estas ankoraŭ eksperimenta. Ĝi estu la 0-a versio, la prov-versio de la semajno. Se la afero sukcesos, la venontan jaron ĝi estos oficialigata.

Mi scias, ke pluraj el vi jam faras siajn planojn pri la 15-a de decembro kaj pro tio mi provas informi vin per ĉiuj rimedoj je dispono.

Ne forgesu raporti pri viaj planoj kaj pri viaj agadoj dum la semajno.

Renato Corsetti

Anoncoj

RevuServo de DEA

Denove la nova jaro alproksimiĝas, kaj nun estas tempo mendi revuojn.

Se vi deziras aboni, skribu aŭ telefonu por ĝirilo – sed bonvolu memori, ke la limdato por enpago estos la **10-a de decembro 2005**.

Kontaktu min telefone 3920 6348 aŭ 2140 8487 aŭ rete arne-casper@email.dk aŭ arne-casper@dbnet.dk (mi ŝanĝos dum novembro).

Pagonte, bonvolu uzi la kodo(j)n:

Kodo	Nomo	Abonprezo
Esp	Revuo Esperanto	265.- DKK
OdE	Ondo de Esperanto	205.- DKK
LE	La Espero	170.- DKK
Fon	Fonto	225.- DKK
NV	Naturista Vivo	110.- DKK
LJ	La Jaro	40.- DKK
JA	Juna Amiko	110.- DKK
LKK	La Kancerkliniko	170.- DKK
Kom	Komencanto	115.- DKK
Kon	Kontakto	160.- DKK
LS	Litova Stelo	105.- DKK
Mon	Monato	345.- DKK
Oom	Oomoto	80.- DKK
TT	Tejo Tutmonde	83.- DKK
FE	Femina	150.- DKK
HdE	Heroldo de Esperanto	250.- DKK
LF	Literatura Foiro	235.- DKK

Bildoj de aktivecoj



Deĵorantoj en nia budo en Kopenhago dum la 27-a de aŭgusto: Jytte, Kim kaj Villads.

Aŭtuna festo en la Klubo de Malmö – gastis sep danoj



Filatelia ekspozicio en Vejle 28-30 oktobro. Benny Nielsen de Næstved montris amason da Esperanto-rilataj poŝtaĵoj.